

... Ke ĉiuj tiuj aventuroj estas nur pretekstoj por priskribi la psikologion de la herooj, tion ŝajnas konfirmi la fakto, ke Prévost priskribas tiujn aventurojn tre sobre...

... Eĉ la forfuĝo de Des Grieux el Saint-Lazare okazas tre facile, kaj en ties priskribo Prévost eĉ emmetas certan humoron. Ŝajnas ke ĉiuj tiuj aventuroj estas por Prévost simplaj formalajoj, kiujn li plenumas ridetante.

Tamen li kelkfoje amasigas aventurojn, kies neceseco estas tre dubinda, kies nura utilo estas pipri la rakonton. Ni supozu, ke la epizodo pri la itala princo (kiun Prévost aldonis en 1753) prezentas psikologian intereson, kiel asertas la aŭtoro, sed la forrabo de la filo de G... M... fare de la korpogardistoj dum Des Grieux dividas kun Manon lian vespermanĝon kaj liton, estas amuzaĵo de la aŭtoro, ekstravaganca epizodo. Same, la murdo de la servisto dum la forfuĝo el St-Lazare, same la murdo de Lescaut : senkonsekvencaj kaj senrezultaj epizodoj, kiuj nepre memorigas la pure aventurajn romanojn...

... Sed kio plej gravas estas la etoso, la kadro. Kaj tiu etoso estas tiu de la aventurromanoj pro multaj detaloj kaj notetoj, precipe la rolo de la mono kaj de la ludo. Sub niaj okuloj evoluas tuta mondo de aventuristoj el ĉiuj sociaj tavoloj : de la princo de... kaj la duko de..., ĉefoj de bando de kavaliroj-friponoj, ĝis la lakeoj, kiujn oni facile koruptas per kelkaj moneroj. (Ekz. : la servisto de la Hospitalo, la fiakristo, k.a.). Ĝi estas la mondo de koruptado ; ni evoluas meze de la kanajlaro de la tiama socio en mondo, kie oni intermurdiĝas pro afero de virino aŭ kverelo de ludo. Vidu ekzemple kiel M. de T. proponas al Des Grieux reakiri Manon pere de armiloj. La entrepreno de Des Grieux

por liberigi Manon sur la vojo al Le Havre ne estas nur la lasta ekstremaĵo de la heroo por savi sian amatinon, ĝi estas la entrepreno de aventuristo, tia, kiaj ekzistis multnombraj ekzempleroj en tiu epoko.

Ofte ni sentas nin en etoso de romano de Dumas : scenoj en gastejoj, arkistoj, ŝargigantaj pistoloj, elingigantaj spadoj... Foje ni sentas la detektivromanon, ekz. dum la pridemandado de Des Grieux fare de la ĝenerala Polica komisaro, kaj eĉ ni flaras la nigran romanon : « Jen estas Lescaut, li diris pistolpafante ; ĉiĉespere li festenos kun la anĝeloj »...

... La plej interesa rolulo, la plej pitoreska estas sendube la frato de Manon, kiu kunigas ĉiujn ecojn de la perfekta aventuristo : brutala soldato, ludfripono, amormakleristo, plie malkuraĝulo : li fanfaronas antaŭ senarma homo (t.e. la fiakristo post la forfuĝo de Manon el la hospitalo), sed tremas vidante spadon (kiam Des Grieux lin minacas). Tiu ĉi ege pitoreska persono, tiu ĉi brutalulo simbolas la krudecon kaj koruptecon de la medio, en kiu vivas kaj agas niaj geherooj.

Do, la romano de Prévost enkondukas nin en la etoson de la aventurromano. La aŭtoro, malgraŭ la sobreco de sia stilo, malgraŭ la klasika deco, kiun li plej ofte respektis (enestas tre malmultaj vere realismaj priskriboj), tamen ne domaĝis la detalojn por krei tiun etoson...

... Ni vidas, ke ne estis paradokse aserti, ke Manon Lescaut estas aventurromano ĝuste tial, ĉar ĝi estas amromano.

M. DUC GONINAZ

Prezidanto de la Franca Esperanto-Instituto.



Ĉu vi pagis vian abonon ?

Ĉu vi abonigis viajn eksterlandajn amikojn ?

Atentu pri la nova poŝtĉekkonto :

Pierre BABIN

5, boulevard Buisson

17 - Rochefort-sur-Mer

C.C.P. Nantes : 2.813.61